

Johann Wolfgang von Goethe,  
Faŭsto, Unua parto, Nokto

*tradukita de Boris Mirski*

*(Faŭsto sidas maltrankvile en sia fotelo ĉe la pulto, en malvasta gotika ĉambro kun  
alta arkaĵo.)*

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Faŭsto, 1a parto, Nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*En alte volbita, malvasta gotika ĉambro Faŭsto, sidanta maltrankvile sur sia  
seĝo ĉe pupitro.*

...

FAŬSTO:

Filozofio! Havu ĝin!  
 Scienco jura, medicin',  
 Ho ve, teologia tent',  
 En kiun pens' enstudis sin, -  
 Mi ĉion lernis kun atent'.  
 Nun, kompatinda malsaĝul',  
 Mi staras post ĉi vana streĉ'  
 Ol iam malpli saĝa eĉ. -  
 Magistr' nomiĝas mi, doktor'.  
 Kaj dum dek jaroj de fervor'  
 Maldekstren, dekstren, - laŭ okaz' -  
 Disĉiplojn tiris laŭ la naz',  
 Kaj fine venas al konkludo,  
 Ke vana estas ĉiu studo.  
 Bruligas koron tiuj rememoroj.  
 Jes, vere mi estas pli inda, laŭ moroj,  
 Ol ĉiuj skribistoj, magistroj, doktoroj;  
 Ne tranĉas min duboj, skrupuloj pri vero,  
 Timigas nek diablo, nek tuta infero.  
 Kaj tial neniam mi ĝojon atendas;  
 Neniam mi veron ekkoni pretendas,  
 Kaj eĉ en la penso ne volas prospekti,  
 La homojn bonigi aŭ ilin direkti.  
 Ĉe mi neniun don':  
 Nek bon', nek mon', nek iu kon'.

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

...

FAŬSTO:

Estas mi, aĥ, okupinta min pri  
 Jur', medicino kaj filozofi',  
 Studis mi teologion kun  
 Granda fervoro, domaĝe, nun.  
 Mizera stultulo ja estas mi,  
 Apenaŭ nun scias mi iom pli;  
 Nomigas magistro mi, eĉ doktor',  
 Dum deko da jaroj jam kun fervor'  
 Tiradas mi tien kaj reen la  
 Studentojn je nazo ilia ja -  
 Vidante, ke ne povas scii mi ion.  
 Apenaŭ mi povas elteni tion!  
 Mi estas ja multe pli saĝa ol ĉiuj  
 Skribistoj, doktoroj, pastraĉoj tiuj.  
 Skrupuloj kaj duboj min ne turmentas  
 Kaj pro la infer' mi nenion pentas.  
 Pro tio min ankaŭ ĉio nur tedas  
 Kaj ion utilon mi scii ne kredas.  
 Ne kredas mi povi ion instrui,  
 La homojn bonigi aŭ iel influi.  
 Posedas nek iom da mono mi,  
 Nek gloron en tiu mondo ĉi.  
 Eĉ hundo ne volus elteni tion,  
 Pro tio mi studas nun la magion,  
 Ĉu eble al mi malkaŝiĝu per  
 Spirita forto iu mister',  
 Por ke mi ne devu paroli plu pri  
 Aferoj, kiujn ne konas mi,  
 Por ke mi ekkonu, per kio je l' fin'  
 La mondo interne kuntenas sin,  
 Ke spektu mi ĉiujn generajn fortojn,  
 Diraĉu ne plue malplenajn vortojn.

*Traduko de la Germana poemo "Faust, 1. Teil, Nacht" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de BORIS MIRSKI (Bela Manto, †1919).*

*Arg-264-957 (2010-01-11 14:55:41)*

*Unue tiu ĉi tradukaĵo aperis en la rusa Esperanta revuo "La Nova Epoko" en Moskvo, en la jaro 1922.*

.....

*Traduko de la Germana poemo "Faust, 1. Teil, Nacht" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1994-07-12.*

*MR-231-3 / Arg-264-532 (2004-09-06 22:38:37)*